





tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

junio 2019 / n-ro 133



-  Esperanto estas protekta nemateria heredaĵo de Respubliko Kroatio - Z-7298
-  La projekto: Multlingva Akcelilo – elprovita en lernejoj
-  Vodnikova 9 – nia nova adreso
-  Bjelovar invitas al sia 110a Esperanto-jubileo en septembro

De post kiam en la jaro 1980 startis la unua numero de Tempo, ni ne havis pli signifan novaĵon por vi: Ministerio pri kulturo dissendis en februaro gravan dokumenton pri Esperanto. La dokumento portas la daton de la 11a de februaro. Per ĝi la Ministerio informis ke Esperanto ricevis statuson de nemateria kultura heredaĵo de Respubliko **Kroatio**.

Post **Pollando** en la jaro 2014, jen ankaŭ **Kroatio** atingis la plej altnivelan rekonon por Esperanto. La Ministerio informis ĉiujn Esperanto-klubojn pri la nova statuso de Esperanto en Kroatio, samtiel ankaŭ ĉiujn filiojn de Ministerio pri kulturo en diversaj regionoj de la lando.

Kroata Esperanto-Ligo startis la laborojn por atingi tiun statuson en la jaro 2015 surbaze de la decido de la jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo. Multe helpis la stimuloj venintaj de la prezidanto de Europa Esperanto - Unio **Sean O' Rian**. Longis la vojo kaj multis la obstakloj, sed jen, ni sukcesis. La procezo de la ekzamenado kaj kompletigo de la materialoj daŭris kvar jarojn. **Spomenka Štimec** gvidis la kandidatigan laboron ĉe la komisiono pri la nemateria kultura heredaĵo, kiu laboras ene de Ministerio pri kulturo.

Estus eĉ pli bele se tiu informo de la Ministerio venus okaze de la 110a jubileo de la organizita Esperanto-Movado en **Kroatio**, kiun ni festis la 2an de novembro 2018 en la Zagreba Pupteatro por povi publike deklari ĝin.

Sed bona novaĵo neniam malfruas.

La festo por proklami la novan statuson de Esperanto en **Kroatio** okazis kadre de Meteorita festo en **Hraščina** la 26an de majo 2019, por kiu la komunumo de **Hraščina** aprobis la monon de 2.000,00 kn. Muzikis viglaj muzikistoj el la ensemble "Sep okonoj" (7/8) kiuj flegas la

makedonstilan muzikon. Ilin gvidas la direktisto, violonisto kaj aranĝisto **Bruno Urlić**. La makedonajn kantojn kantis en Esperanto la sonorvoĉa zagreba virina ensemble **Ezerki**, gvidata de **Lena Đapić**. La ensemble **Ezerki** estas aktuale la sola ensemble kun esperantlingva repertuaro. Dek virinoj en la makedonaj kostumoj kantis ankaŭ makedone. Inter la kantistinoj de diversaj profesioj estas ankaŭ **Sonja Burić**, la pedagogino de la Zagreba elementa lernejo **Retkovec**, kie disvoviĝas la projekto Multlingva akcelilo, financata per EU Fondaĵo Erasmus plus.

Kadre de la programo estis prezentita mallonga superrigardo pri Esperanto de post la jaro 1889 en **Kroatio**. Post la prezento de esperantaj atingoj kadre de la nacia programo, la profesoro pri arkeologio, la iama vicministro pri kulturo Prof. D-ro **Krešimir Filipec** prelegis pri arkeologiaj eltrovaĵoj en la regiono **Hrvatske zagorje** kun aparta fokuso al **Lobor**, la historia centro de la povo.

La feston ĉeestis sepdeko da homoj.

Kio novas krom la protektata statuso de Esperanto en **Kroatio**?

Disvolviĝas la granda multlanda projekto Multlingva Akcelilo kiun gvidas **Zlatko Tišljar** kaj **Maja Tišljar**. Pri la aktualaj atingoj raportas **Zlatko Tišljar**. Grupo da lernantoj el la elementa lernejo el Ŝentilj en **Slovenio** vizitis **Zagrebon** kaj krom la lernejo **Retkovec** gastis ankaŭ en la novaj ejoj de KEL kaj konatiĝis kun esperantlingvaj bildlibroj.

Nia apartamento por turistoj **Espera** en Vodnikova 9 ekfunkciis. La unuaj dudek turistoj jam ĝuis ĝin. Ni ricevis de niaj gastoj bonajn recenzojn.

En la landa Movado **Bjelovar** preparas sian grandan 110-jaran feston okazontan de la 20a ĝis la

22a de septembro. En Đurđevac estas konstruata la nova domo de Dokumenta Esperanto-Centro, vizitebla dum la festo en **Bjelovar**.

Kroata Fervojista Esperanto-Asocio elektis sian novan estraron kun la prezidantino **Roža Brletić Višnjić**, renkonte al la 65a jaro de la asocio. **Zlatko Hinšt** partoprenis IFEF-kongreson en **Malaga**. La societo en junio omaĝis al la centa naskiĝjubileo de sia iama granda aktivulo **Marinko Gjivoje**.

La societo perdis en februaro sian fidelan membron **Anka Šantolić-Špehar**. **Nedeljko Korasić**, la esperantisto kiu de 1950-aj jaroj kontribuis al viglo de la Zagreba Esperanto-komunumo mortis en marto 2019. Trideko da zagrebaj esperantistoj adiaŭis de li ĉe la Zagreba tombejo Krematorij kaj aldone kunsidis omaĝe al li la 13an de marto 2019 en Vodnikova, heredinte lian esperantan bibliotekon.

La 1-an de junio 2019 okazis la kunsido de la Asembleo de Kroata Esperanto-Ligo. Antaŭis al ĝi plurmonataj laboroj por starigo de nia biblioteko ĉe la nova adreso en Vodnikova 9.

Kelkaj membroj preparas sian partoprenon en Universala Kongreso de Esperanto en **Lahti** en **Finnlando**. Aparte ĝojige estas ke Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj ricevis subvencion por partopreni en la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en **Lahti** en **Finnlando**, kies organizanto la Unuiĝo estis en 2018.

Studenta Esperanto-Klubo post kelkaj jaroj da nepartopreno decidis ĉi-somere iri al Internacia Junulara Kongreso en **Liptovsky Hradok** en **Slovakio**. La vojaĝon preparas **Robert Milijaš**, kaj **Roberto Maglica**.

Zlatko Tišljar Pajo regalias nin per la traduko de *Domo de erinaco*

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Post la jaro 2017 aperas du fojojn jare rete kaj sur KD. Ĝis la jaro 2017 aperis papere. Jaro XXXIX, numero 133 (1/2019). ISSN0352-1583. Sona numero 51/2019.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj en Zagrebo ekde 2004. Voĉlegas Spomenka Štimec kaj Neven Kovačić. Lingve kontrolis: Davor Klobučar. Bonvolu legi la retan version de Tempo ĉe www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

Redakcio/Uredništvo; Eldonisto/Izdavaĉ Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR10000 Zagreb, Kroatio +385 (91) 4617550; esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Dragutin Balagović, Siiri Balagović, Roža Brletić-Višnjić, Branko Ćopić, Klaus Günkel, Franjo Forjan, Zlatko Hinšt, Antun Kovač, A. Kranjčić, Jana Pezelj, Jasminka Štimac, Spomenka Štimec, Ivan Špoljarec, Krunoslav Tišljar, Zlatko Tišljar.

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: Esperantaj eldonaĵoj en Interliber 1987 (Fotis Ivan Špoljarec)



RESPUBLIKO KROATIO

Ministerio de Kulturo

Administra oficejo por protekto de kulturheredaĵo

KLASNUMERO: UP II-612-081 1 8-06/0150

UR-Numero: 532-04-0 1 -03-02 12-19 -2

Zagreb, la 11-an de februaro 2019

Ministerio de Kulturo baze de la artikolo 12,

parto 1 de la Leĝo pri protekto de kulturfenomenoj („Narodne novine”, numero 69199, 151/03, 15¹1103, 87/09, 88/10, 61111, 25112, 136112, 157113, 152114, 44117, 90/18) kaj artikolo 20, partoj 1 kaj 2 de la Regulo pri formo, enhavo kaj maniero gvidi Registron de kulturfenomenoj de Respubliko Kroatio („Narodne novine”, numero 69199, 151/03, 15¹1103, 87/09, 88/10, 61111, 25112, 136112, 157113, 152114, 44117, 90/18), akceptas



SKRIBAN DECIDON

1.

Oni konstatas ke la TRADICIO DE ESPERANTO en Kroatio havas karakteron de nemateria kultura fenomeno sence de la artikolo 8, parto 1, alineo 1e de la Leĝo pri protekto kaj konservo de kulturaj fenomenoj.

2.

Kiel kulturfenomeno el punkto 1. de ĉi tiu Decido estas starigita jena sistemo de protekto:

- oni devas certigi atingeblon de la kulturfenomeno por la ĝenerala publiko,
- instigi kunlaboron de unuopuloj, grupoj kaj la komunaj kiuj heredigas la fenomenon rilate identigon, difinon, plu kreadon kaj transdonon de la heredaĵo,
- Popularigi kaj diskonigi la kulturfenomenon per okazigo de ekspozicioj, fakaj renkontiĝoj per elektronikaj medioj, aŭd- kaj vid- dokumentado kaj alimaniere,
- instigi transdonon kaj flegadon de la kulturfenomeno
- instrui necesan fakan personaron por transporto de la scio per seminarioj kaj laborejoj de formala kaj neformala instruado,
- daŭrigi la esploron de la kulturheredaĵo, per adekvata dokumentado en ĉiuj formoj kaj manieroj de moderna printado kaj per faka kaj scienca valorigado,
- diskonigi la funkcion de la kulturfenomeno en la socio kaj enplekti la protekton de la fenomeno en planitajn evoluprogramojn,
- interesigi la publikon kaj protekti la fenomenon konsiderante la procezojn de tutmondigo kaj de sociaj transformiĝoj por eviti danĝeron ke la fenomeno malaperu, estu detruata aŭ disvendata
- La portantoj de la kulturheredaĵo estas taskigitaj protekti la fenomenon.

3.

La portantoj estas ĉiuj juraj kaj fizikaj personoj, notitaj sur la listo de la portantoj, kiu estas konsista parto de ĉi tiu Decido. Pri ĉiuj ŝanĝoj rilate la portantojn, la decidpova organo devas informi Fakan Komisionon por akcepto de la kulturfenomenoj kiu harmonie kun la postulo ŝanĝos la liston de la portantoj.

4.

Al la dirita kulturfenomeno el punkto I. de la citita Decido oni aplikas Leĝon pri protekto kaj konservo de kulturfenomenoj kaj ĉiujn regularojn kiuj rilatas al kulturaj fenomenoj.

5.

La prilaborita kulturfenomeno estos enskribita en la Registro de kulturfenomenoj de Respubliko Kroatio sur la listo de protektitaj kulturfenomenoj sub la numero Z – 7298.

6.

Eventuala plendo ne prokrastas efektivecon de ĉi tiu Decido.

de **Branko Ĉopić**, la poemo pri la valoro de la propra hejmo, kiun ĝuis multaj generacioj de infanoj kaj plenkreskuloj. Ni petis *Zaklada Branka Ĉopića* en **Beograd** la permeson de publikigo. La tradukinto dediĉis sian tradukon al sia nepo Lunar.

Esperanto-Societo **Tibor Sekelj** havas viglan sezonon malantaŭ si en la novaj ejoj en Vodnikova 9: ĝi finis sian printempan sezonon en la nova ejo per tri aldonaj literaturaj programoj pri kiuj zorgis **Ankica Jagnjić** kaj **Teodora Kučinac**. En la lasta duonjaro pli ol 120 vizitintoj venis aŭskulti la programerojn kaj viziti la novajn ejojn. Estis prezentita la esperantlingva traduko de *Domo de erinaco* de **Branko Ĉopić**, omaĝo al **Tibor Sekelj** kaj vespero de **Julio Baghy**

Kadre de la regulaj monataj prelegoj de la societo, laste prelegis **Zdravka Metz** el **Kanado** pri preparoj por UK en **Montrealo** okazonta en la jaro 2020.

La sonan Tempon ni preparas per la financa helpo de Ministerio pri kulturo. Krom aŭdata sur la kompaktdiskoj, Tempo estas legebla ankaŭ en nia retejo www.esperanto.hr, pri kiu zorgas **Davor Klobuĉar**.

Spomenka Štimec

Klarigo pri la decido

Internacia lingvo Esperanto estas planlingvo, kiun iniciatis Ludvig Lejzer Zamenhof kaj prezentis ĝin al la publiko en publikaĵo en la rusa lingvo presita en 1987 en Varsovio sub la titolo Internacia Lingvo „Mednarodni jezik“. Samjare aperis eldonoj en la franca, pola kaj germana lingvoj. La publikigo de tiu ĉi planlingva projekto koincidas kun la pli vasta historia kunteksto pri lingva kreado en la dua duono de la 19a jarcento kiam al la publiko prezentigis kelkdeko de intrenacilingvaj projektoj kiel rimedo de nacie neŭtrala lingva komunikado. Kiel lingvo kun simpla gramatiko sen esceptoj kiujn havas amase etnaj lingvoj, kun vortoj bazitaj je eŭropa internacia leksiko kaj latinismoj (ĉirkaŭ 70%) kaj malpli je ĝermanismoj (20%) kaj el aliaj lingvoj, Esperanto supervivis ĉiujn siajn historiajn rivalojn kaj estas ankaŭ nuntempe uzata kiel alternativa rimedo de internacia komunikado. Aparte ĝia graveco estis kaj estas ankaŭ nuntempe por la tiel nomataj malgrandaj popoloj kiuj per tiu ĉi lingvo havis kaj havas eblecon prezenti siajn kulturojn al la mondo kaj per ĝi mem konatiĝi pri la samspecaj atingoj de aliaj popoloj. La kroata kultura kaj scienca publiko el la komenco de Esperanto estis fundamente informita pri la planlingva situacio fine de la okdekaj jaroj, ĉar la fama kroata filologo Tomo Maretić dum la solena kunveno de la Jugoslavia Scienca Akademio en Zagrebo en 1891 dediĉis sian prelegon ĝuste al strukture kompara analizo de tiutempaj planlingvoj kritike tuŝante ankaŭ Esperanton. Tiam la esperantista movado, kiu sian disfloradon havos en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento kaj dum la tempo antaŭ la 1-a mondmilito troviĝis nur en la komenco mem kaj inter unuaj esperantistoj estis jam kelkaj unuopuloj el la teritorio de la nuna Kroatio. Organizitaj formoj de la Esperantista Movado aperas en la jaroj 1907, 1908 kaj en komenco de 1909, kiam en Zagrebo estis fondita Societo de Kroataj Esperantistoj, kiujn gvidis leksikografo, ĵurnalisto, antologiisto kaj tradukisto Mavro Špicer kaj instruistino Danica Bedeković, pl. Pobjenička. Ili mem verkis unuajn kroatajn lernolibrojn de Esperanto kaj redaktis la revuon Kroata Esperantisto kies unua numero aperis en 1909 kaj sur kies titolpaĝo estis traduko de la poemo de Petar Preradović Mia Barko. Estis du deklaritaj celoj de la menciita revuo: unuflanke ĝi devus disvastigi Esperanton en Kroatio kaj aliflanke ĝi devus nian riĉan sed nemulte konatan literaturon enkonduki en Esperanton, en misteran landon, kiu troviĝas nek sur la Luno, nek en la Kosmo sed en koroj de ĉiuj esperantistoj kaj en iliaj animoj. Jam en 1912 aperas antologio de kroata poezio en esperanta traduko de Mavro Špicer. Dum la tuta historio de esperantismo en diversaj socipolitikaj ŝtatsistemoj en kiuj Kroatio estis ĝis la nunaj tagoj, kroataj esperantistoj daŭrigis kontinue aktivi antaŭenigante kroatan literaturon kaj kulturon en la mondo kaj en tio ofte esperantaj tradukoj de verkoj el kroata literaturo servis kiel bazo por traduko al neeŭropaj lingvoj kiel la ĉina, hinda kaj farsa. La plej nova ekzemplo de la diskonigado de kroata literaturo en Esperanto estas traduko de la konata plurfoje premiata romano Nigra Patrino de la Tero de Kristian Novak aperinta en 2017). La tradukon efektivigis kroata esperantisto kaj publikigisto Josip Pleadin. Kroataj esperantistoj donas escepte aktivan, organizitan, sciencan, artan kaj kulturan kontribuon al tutmonda esperantista komunumo, kiu intertempe evoluigis aŭtentikan kolektivitan kulturon kaj identecon kun specifaj komunikaj praktikoj kaj paradigmoj, kun organiza strukturo kaj kulturaj fenomenoj kaj formuloj. Plue kroataj esperantistoj riĉigas la kroatan kulturmedion per sia aktivado kaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj organizante diversajn kongresojn studarangojn kaj kulturajn manifestadojn en kiuj kunpartoprenas esperantistoj el diversaj landoj, kiuj

transportas al kroata medio per Esperanto kulturajn kaj artajn atingojn de siaj popoloj.

Rememorante gravan rolon de Esperanto kiel rimedo por diskonigo de kroata kulturo en la mondo dum 100 jaroj de la E-movado en Kroatio okazis en Zagrebo en novembro 2008 en la Filozofia Fakultato de la Zagreba Universitato internacia scienca simpozio sub la titolo Esperanto kaj Kroata Kulturidenteco, en kiu partoprenis trideko da prelegantoj. Samkiel la prizorgo de lokaj idiomoj je nacia nivelo rekte kontribuas al prizorgo de tutmonda lingva diverseco kiel valoro per si mem pro la minaco ke pro la formorto de idiomoj kaj lingvoj kun malgranda nombro de parolantoj (ĉ. 5000) malaperu aŭtoktonaj kaj neripetebaj pensprimaj specimenoj kiuj kreas spirit-kulturan heredaĵon de la homaro, same la prizorgo kaj defendo de la internacia lingvo Esperanto kiel tutmonda kulturlingva heredaĵo de la homaro gravas ankaŭ sur naciaj niveloj, ĉar tio ebligas al malgrandaj popoloj kiel la kroata siajn kulturatingojn per ĉi tiu nacie neŭtrala rimedo de internacia komunikado prezenti al la monda esperantista publiko. La esperantista komunumo (ĉiuj parolantoj de Esperanto en Kroatio ĉu kiel individuoj ĉu unuigitaj en societoj aŭ neformalaj grupoj) evidentiĝas en forta esprimado de komuna solidareco kaj socia kohezio same kiel ĉe ĉiuj komunumoj.

La rolo de Esperanto kiel lingvo peranto por disvastigo de kroata kultura kaj arta kaj aparte de literatura heredaĵo kaj moderna literatura produktado estas argumento por enskribi ĉi tiun lingvon kiel nemateria atingajo en Registron por nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de Respubliko Kroatio. Komisiono por nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de Kulturo dum sia kunsido okazinta la 29-an de majo 2017 taksis ke la tradicio de Esperanto en Kroatio havas karakteron de nemateria kultura fenomeno laŭ la difino de la Leĝo pri Konservado de Kultura Heredaĵo en la paragrafo 9, parto 1, alineo 1. Baze de transdonita dokumentaro kaj prezentitaj faktoj, kaj pro la rekomendo de la Komisiono por nemateria kultura heredaĵo, Faka Komisiono por konstato de la karakterizoj de kultura fenomeno, dum sia kunsido okazinta la 18-an kaj 19-an de decembro 2018 konstatis ke la tradicio de esperanto en Kroatio havas karakteron de kultura fenomeno. Akceptante ĉi tiun skriban decidon harmonie kun la artikolo 12, parto I de la Leĝo pri konservo de kulturaj heredaĵoj estas aplikataj je Esperanto laŭ la citita Leĝo kaj aliaj preskriboj kiuj rilatas al kulturaj fenomenoj. Harmonie kun la artikolo 12, de la parto 4 de la sama Leĝo per punkto 5 de la ekspliko de tiu ĉi skriba decido estas difinita la devo enskribi la prideciditan fenomenon en Registron de kulturaj fenomenoj de Respubliko Kroatio en la Liston de konservataj kulturaj heredaĵoj harmonie kun la artikolo 12, parto 5 de la Leĝo pri konservo kaj defendo de kulturaj fenomenoj.

La plendo kontraŭ ĉi tiu skriba decido ne prokrastas ties efektivigon pro la supre esprimitaj kaŭzoj, deciditaj kiel en la ekspliko.

Instrukcio pri jura procedo.

Kontraŭ tiu ĉi decido oni povas plendi al la Komisiono pri plendoj de la Ministerio de Kulturo en la tempolimo de 15 tagoj ekde ties akcepto. La plendo estas transdonata al tiu ĉi organo senpere aŭ oni sendas ĝin per poŝto rekomendite kaj oni povas ankaŭ deklari ĝin antaŭ la Protokolo. Al la plendo harmonie kun la Leĝo, artikolo 9, parto 2, punkto 29 de la Leĝo pri administrataj pagoj, oni ne pagas administratajn kostojn („Narodne novine“ numero 115/16).

Helpanto de la Ministrino Davor Trupković, dipl.inĝ. arĥ
Esperantigis Zlatko Tišljar

FESTO

okaze de la proklamo de Esperanto nemateria kultura heredaĵo

Kultura programo okaze de la proklamo de Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo de Respubliko **Kroatio** okazis kadre de la 23a Meteorita festo en **Hraščina** en **Zagorje** la 26an de majo 2019. Sepdek personoj partoprenis, pluraj alvenintaj buse el Zagrebo. En Esperanto plurajn makedonajn kantojn kantis virina ensemblo Ezerki, akompanata de muzikensemblo **Sep okonoj** gvide de sia ĉefdirektisto **Bruno Urlič**. La tekstojn de la kantoj esperantigis la zagreba makedonanino **Dinka Šimunić**.

Salutis **Judita Rey Hudeček**, nome de KEL kaj la gastiganta Esperanto-Societo „Trixini“ kaj nome de la muzikistoj kaj kantistoj el Kroata-Makedona societo. **S. Štimec** enkonduke prezentis la plej gravajn atingojn tra 111 jaroj de la kroata Esperanto-organizaĵo. La programo okazis dum la ĝardeno festo apud la historia konstruaĵo.

Post la omaĝo al Esperanto en **Kroatio**, la iama vicministro pri kulturo **Krešimir Filipec**, profesoro pri arkeologio el la zagreba Filozofia fakultato, prelegis pri **Lobor**, la iama centro de la potenco.

La koktelon prizorgis **Zdravka Metz, Juraj Drnjević, Jadranka Farszky**. Pluraj membroj de Ezerki alportis makedonajn bongustaĵojn por la festo.

La komunumo **Hraščina** financis la programon kadre de Meteorita festo per 2.000 kn.

S. Štimec



Fotis Jasminka Štimac

VODNIKOVA 9 - nia nova ejo

1. Spomenka Štimec	40,54 eŭroj
2. Mladenka Đaković	73,54 eŭroj
3. Đivo Pulitika	81,00 eŭroj
4. Zlatko Tišljar	100,00 eŭroj
5. Damir Mikuličić	69,56 eŭroj
6. Melita Sarić	12,00 eŭroj
7. Željko Gubijan	40,54 eŭroj
8. Zlata Nanić	67,56 eŭroj
9. Jelena Lončarević	16,21 eŭroj
10. Božidar B. Bagola	33,78 eŭroj
11. Sanja Težulati	9,45 eŭroj
12. Siniša Dvornik	27,02 eŭroj
13. Domagoj Vidović	5,04 eŭroj
14. Vesna Staničić	295,00 eŭroj
15. Zdravko Gazdek	8,10 eŭroj
16. Anto Mlinar	405,40 eŭroj
17. Olga Srkoč	63,51 eŭroj
18. Davor Klobučar	162,16 eŭroj
19. Zdravka Metz	16,20 eŭroj

Sume: 1.526,61 eŭroj

Inter decembro 2018 kaj majo 2019 niaj membroj kolektis por Vodnikova 1.526,61 eŭrojn. Ekde la jaro 2003 ĝis novembro 2017 ni kolektis inter niaj membroj kaj amikoj 58.874,03 eŭrojn.

Nia lasta kredito al Esperanto-Societo Trixini en majo 2018 estas 2.509,42 eŭroj.

Nia ŝuldo por provizado de la turisma apartamento Espera en Vodnikova 9 per mebloj en majo 2019 estas 1261 eŭroj.

Dankon al la membroj kiuj helpis al ni havi propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia banknumero en Raiffeisen banko: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR 6124840081100881157. Modelo 00.

La turisma apartamento Espera komencas ricevadi siajn unuajn gastojn en 2019. Per la gajnita mono ni repagadas la novakiritajn meblojn de la apartamento Espera. La fimao Izvori registris Esperan kiel zagreba turisma ejo. La lupreninto - la firmao Izvori - okupiĝas pri venigo de turistoj, administrado de turistoj, pagado de turisma imposto, preparado de la ejo por turistoj kaj purigado. Speciala komisiono elektita de la Asembleo de KEL kreis kontrakton pri luado por la tempo 2019 -2020.

Finiĝis la lernojaro kaj finiĝis ankaŭ E-kursoj en tri bazaj lernejoj (Zagreb – Kroatio, Ŝentilj – Slovenio kaj Vraca – Bulgario). La kursoj daŭris dum 64 lernohoroj laŭ la lernprogramo kaj didaktikaĵoj kiujn paralele kreis la teamo de la projekto Multlingva Akcelilo. Komencis lerni po 14 infanoj 8-9-jaraj en ĉiu lernejo kaj finis ĉion entute 30 infanoj (ĉar intertempe oni ŝanĝis la klasojn kaj kelkaj infanoj foriris en aliajn klasojn). Fine de la projekto mi mem okazigis ekzamenojn pri la rezultoj por la grupoj en Ŝentilj kaj Zagreb. Entute 20 infanoj partoprenis en la ekzamenoj kaj nur unu malsukcesis fari tion, kio estis la celo: kapabli kunmeti eseeton el minimume 10 frazoj pri al si konataj temoj kaj ĉiu devis kapabli dum tri minutoj eldiri minimume 7 frazojn pri simplaj temoj. La kvanto de gelernantoj estas tro malgranda por povi ion el tio konkludi, krom ke la motivo por lernado ĉe ĉiuj estis granda kaj ke la aktivecon kun ĝojo efektivigis kaj la infanoj kaj la geinstruistoj kaj la gepatroj. Fine de la lernojaro, je la iniciato de la geinstruistoj mem okazis du unutagaj renkontiĝoj de la grupoj el Zagrebo kaj Ŝentilj: Unue en Zagrebo kaj poste en Ŝentilj kie la infanoj pli bone interkonatiĝis reciproke kaj vidis la lernejan laboron kaj organizon en la du ŝtatoj.

Kiel mi jam skribis en antaŭaj artikoloj, la tuta praktiko elprovi la novan instrudidaktikon en minimume tri lernejoj montris interalie kelkajn neantaŭvideblajn rezultojn: ke ĉiuj tre ŝatis la lernadon kaj ke la gepatroj kaj la geinfanoj demandas ĉu kaj kiel ili povos daŭrigi la lernadon kaj ke ili mem je la propraj kostoj komencis krei amikecojn per reciprokaj vizitoj.

Kio koncernas la didaktikon, ĉiuj antaŭviditaj

antaŭsupozoj estis konfirmitaj: Ke la kurson kun adekvataj instrukcioj povas sukcese gvidi fremdlingvaj geinstruistoj kiuj ne antaŭe lernis E-on, ke la metodo devas baziĝi je minimuma leksiko baze de la plej oftaj morfemoj uzataj en praktika esperantovivo kaj apliko de komputilaj metodoj samkiel uzado de maksimume da dialogado kaj parolekzercoj. Fine de la du kursoj mi faris ankaŭ enketon pri tio, kiuj el la dek diversaj metodunuoj estis al infanoj plaĉaj kaj kiuj ne. Ĉiuj ege ŝatis komputilajn ekzercojn, ekzercojn kreadi frazojn el prezentitaj diverskoloraj vortoj kaj ludado en dialogoj, skeĉoj kaj kantadon de E-kantetoj preparitaj por ilia scinivelo. Iom malpli ili ŝatis legadon de E-tekstoj, ankoraŭ malpli la ambaŭdirektajn tradukojn kaj la plej malŝatata estis la klasika provo parkeri la vortojn.

Post interparolo kun geinstruistoj montriĝis ke la tuta materialo por instrui estis tro ampleksa kaj ne eblis ĉion realigi kaj tio devigas nin en la projekto ankoraŭ malpligrandigi la materialon. Tion ni faros en la lasta fazo de la projekto (ĝis la jarfino 2019). Post tiu lasta interveno en la didaktika materialo la teknika stabo (kreantoj de komputilaj ludoj kaj ekzercoj – Universitato en Odense kaj kreantoj de la projekta paĝaro – Studio Gaŭs - faros sian laboron. Tute ĉe la fino ankoraŭ oni tradukos la tuton al 8 lingvoj de la partneroj kaj Esperanto tiel ke ekzistos publika aliro al instrukiaro kaj metodika materialo por ĉiu interesito en la koncernaj 9 lingvoj.

Dum la Eŭropa Konferenco en kiu oni traktos la instruadon de fremdlingvoj en EU, okazonta fine de aŭgusto en Triesto – Italio, oni aparte sin dediĉos al la rezultoj de Multlingva Akcelilo kaj kiujn perspektivojn tio donas al E-Movado en EU sed ankaŭ pli vaste.

Zlatko Tišljar

La gelernantoj el Slovenio kaj Kroatio post la TV filmado por la elsendo "Bonan matenon, Kroatio" kaj post la radio-elsendo renkontiĝis en la nova ejo de KEL. Fotis Krunoslav Tišljar.





Unu la plej gravaj kroataj esperantistoj **Marinko Gjivoje** naskiĝis la 14-an de junio 1919 en urbo **Korčula** en samnoma insulo **Korčula**, atingante en la jaro 2019 la centjaran jubileon. Surbarze de persona nomo Marinko, kiun oni povas supozi la dusilaba Mar-inko, li elektis sian pseŭdonimon Mara Inko. Lia dua nomo estis Verda Kareso. Kiel

gimnaziano en **Dubrovnik** li fariĝis esperantisto. Li estis membro de Esperanto-societo „Bude Borjan“ ekde ĝia komenco de agado en la jaro 1945. En Zagreb li studis en Agronomia fakultato kaj arkeologion en Filozofia fakultato. Gjivoje estis ĉefa redaktoro de pluraj revuoj. Unue li estis redaktoro de esperantaj revuoj „La Suda Stelo“ (1950-1957), sekvis „Jugoslavia Esperantisto“ (1957-1960), „Jugoslavia Fervojisto“ (1963-1964) kiel oficiala organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE), „Sennacieca revuo“ (1962-1965) kaj „Scienca Revuo“. Li kunlaboris per artikoloj en nacilingvaj gazetoj/revuoj („Narodni list“, „Školske novine“, „Naše planine“, „Matica iseljenika Hrvatske“, „Vjesnik bibliotekara Hrvatske“, „Željeznički vjesnik“, „Speleolog“, „Priroda“, „Historijski zbornik“), ankaŭ en esperantlingvaj revuoj („Geografia Revuo“, „Homo kaj Kosmo“, „Voĉo“, „Kajeroj“, „Monato“, „Scienca revuo“). Ekde la jaroj 1953 ĝis 1973 li gvidis gazetarajn servojn de Universalaj Kongresoj de Esperanto (UKE).

Li estis komitatano de Jugoslavia Esperanto-Federacio por informado kaj dokumentado. Li estis multjara membro de Fervojista Esperanto Societo (FES) Zagreb, kaj ĝia sekretario kune kun **Ana Medić** inter la jaroj 1973 kaj 1978. Li estis sekretario de Kroatia Esperanto-Ligo. La unua lia posteno estis en Jugoslavia Esperanto-Federacio en Ljubljana kiel profesia sekretario de Slovena Esperanto-Ligo, kaj tiel unua pagita esperanta oficisto. Ekde la jaroj 1961 ĝis 1978 Gjivoje postenis en Direkcio de Fervoja Transporta Entrepreno (ŽTP) Zagreb kiel ĵurnalisto de informa gazeto „Željezničar“, kaj post tiu posteno fariĝis pensiulo. Li estis membro de Jugoslavia Esperanto-Instituto. Dum sia vivo li havis problemon pro la pulma malsano kaj pro tio lia vivo ne estis tro longa. Li mortis la 31-an de majo 1982 en Zagreb kaj estis entombigita en la tombejo Miroševac. Gjivoje postlasis sian grandan bibliotekon al Nacia kaj universitata biblioteko en **Zagreb**. En lia naskiĝurbo **Korčula** troviĝas strato kun lia nomo.

Li multe verkis kaj krom artikolojn li havis plurajn verkojn libroforme. Liaj verkoj pri esperantaj temoj estas „Bibliografija međunarodnog jezika u Jugoslaviji“ (1955 kaj kiel parto II 1967), „Bibliografio de beletraj tradukoj de jugoslaviaj verkistoj en la Esperanta gazetaro“ (1964), „Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio“ (1965), „Bibliografio de pli elstraj jugoslaviaj fervojistoj esperantistoj“ (1975), „Konsultlibro pri

Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj“ (1980), „Bibliografija prijevoda djela hrvatskih pisaca na esperanto“ (1981), „Ĉudesni svijet jezika“ (1980) kaj „Esperanto – radnički jezik“ kun d-ro Ivo Borovečki (1981). La plej konataj liaj libroj estis vortaroj. Li dediĉis unu memorlibron honore al pereintaj esperantistoj en la milito inter 1941 kaj 1945. **M. Gjivoje** unue faris vortaron surbaze de verko de **Stevan Živanović** (el 1934) - „Rečnik esperantsko-srpskohrvatski“ (1959 kiel tria eldono) kaj denove en la jaro 1979. Sekvis inversa vortara eldono „Rječnik hrvatskosrpski-esperantski“ (1966) kun du eldonoj poste. Li verkis pri specifaj temoj: historia kaj natura heredaĵo de insulo **Korčula** (en formoj de libro kiel „Otok Korčula“), kaj artikoloj en revuoj pri kavalira ludo „moreška“, pri kostumoj kaj armiloj de **Korčula**, pri Vela spilja / Granda groto en **Vela Luka**, kaj pri klasikepokaj subteraj ŝtonminejoj en adriatikaj insuloj. Li verkis ĝenerale pri arkeologio. Li trifoje eldonis „Zbornik otoka Korčule“ (1970, 1972, 1973). Li ankaŭ verkis pri interlingvistiko (pri sciencaj aspektoj de Esperanto) kaj esperantologio (pri esperantonimoj). Post la morto de **Marinko Gjivoje** aperis „Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj“ (1985) kiu poste inspiris aperigon de „Biografia leksikono de kroataj esperantistoj“ de Josip Pleadin (2002) - (lasta estas uzita fonto kune kun interreta teksto https://eo.wikipedia.org/wiki/Marinko_Gjivoje).

Marinko restas en niaj memoroj, lia granda laboro kaj verko restas nia inspiro kaj instigo.

d-ro Zlatko Hinšt

Fonto: Foto de M. Gjivoje en <https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=139>

Fonto: Fotoj pri librokovriroj de vortaro kaj libro de pri insulo Korčula de Marinko Gjivoje estas el Interreto (pere www.google.hr uzante lian nomon)



LA DOMO DE ERINACO (Ježeva kućica)

Arbar' senvoja, strange susuras
Erinaco Ero en ĝi kuras.
Li ĉasas, oni ofte lin vidas,
kun tricent lancoj en embusk' li sidas.
Kaj lupo kaj urso, eĉ pajaco
konas ĉasiston Ero Erinaco.
Aglo lin ŝatas, lup' lin evitas,
serpento bunta pro timo ŝvitas.
Kvin mejlojn for vastiĝas timego,
sur liaj spuroj vojaĝas glorego.

LETERO DE VULPO

Iun tagon al la fama Ero
venis bela kaj bunta letero.
Miela letero, urso diris,
Eĉ leporpoŝtisto pri ĝi miris.
Adreso kurta, literar' klara:
„Por sinjor' Ero
En la arbaro”
La leter' tekstas:
Ero kara, mi ŝatus vin vidi
Kaj kun vi sidi.
Jen mi skribas en ŝtondomego per anserplumo
en luna lumo!
Venu tagmanĝi en mian hejmon, kaj rapidu,
nenie sidu.
Kun plena poto kaj grasa buŝo,
Atendos mi vin por mana tuŝo.
Mi vin brakumas sen sento de kulpo,
saluton sendas Mica la vulpo”.
Ero tre ĝojas: Jen fajnan manĝon
mi ne rezignu, ĝuu oranĝon.
Erinac' Ero ruze okulumas,
kontrolas lancojn, ĉiun prilumas.
Se eble voje mi vidus batalon,
mi ja pretu, evitu fatalon.

ĈE VULPO HEJME

La suna rond' al zenit' leviĝis
ĉiam Ero ĉe Vulpo stariĝis.
Ĉe domo-Vulpa kun ŝtona muro
aperis Erinaca konturo.
Ero sin klinas, kavalir' vera,
salutas Vulpon per vorto klera.
- Bontagon, Vulpo, virto pura,
riverenc' al vi, kaj domo mura.
Kokaj plumoj la hejmon ornamu,
kokin' en poto domon reklamu.
Flugil' ansera ventumil' via
kuseno mola, anaso dia.
Vivu eterne pace, feliĉe
Hundbojo foriĝu senkondiĉe.
Kaj ankoraŭ ĉi tion mi diru:



Fotis Jasminka Štimac

mi pretas manĝi, prie ne miru.
Ekis la regal' sorĉa, fabela,
Buŝoj grasegaj, ridego bela.
Alvenis vice manĝo post manĝo,
Ero ofte miris pro l' aranĝo,
festparolis pri vulpo-gastamo
kaj pri ĉasista hunda kondamno.
Vicas la manĝoj, kvar horojn daŭras,
la plena stomako ne bedaŭras.

NOKTO

Jen noktiĝas en arbar' malhela
volviĝis ĉio en vual' stela
Oni jen aŭdas noktpapiliojn,
La vento nombras arbajn foliojn.
Silentas arboj, ne plu bruado
Nur brilas okul', ĉesis ĉasado.
Vaganto lampir' lumigis lampon
Briligis stele arbaran kampon.
Kaj strigo hurlis militan krion,
promesis al birdoj ĉasebrion.

DISIĜO

Ero ekstaris, viŝis faŭketon
Hejmen mi iros, vidi dometon.
Estis tre bone, vera regalo
Amikin' kara, kvazaŭ dum balo.
- Domo mia kiel fortikaĵo
Noktu ĉe mi, atendas bakaĵo.
Tiel Vulpo resti lin logas
sed Ero plu foriri arogas.
- Mi dankas nun al invito via,
al mi pli karas la domo mia.
- Restu frateto, vulpo dolĉepas,
petegas, logas, malvesti helpas.
Sed erinaco neniel cedas
- Je domo mia, mi ja pli kredas.
La luno gvidas survoje Eron,
tra la branĉoj heligas la teron.
Iras Ero, parolas al stelo,
- Dometo mia, dolĉa mielo.

POSTĈASO

Restis Vulpo kaj pensis - diable!
Kial li iras, ne estas afable.
Verŝajne la dom' ege valoras,
se Erinaco tiom ĝin gloras.
Eble enestas planko el plumoj,
pigoj bakitaj lumantaj pro luno
Tiu domo pro abundo brilas,
Mi kaŝe post Erinaco iras.

LUPO

Ekkuris Vulpo, silenta ombro,
mola pied' en arbara sombro.
Dum urĝas ĝi en ega silento,
lupo aperas en nokta vento.
- Kien vi hastas, diru al koleg':
Ĉu ie aperis grasa ŝafeg'?

- Mi iras ekscii kial Ero
Domon gardas kiel la pantero?
- Domo sen valor' - malicas lupu,

mi fordonus la mian por supo.
Mi ŝatas ŝercon, mi iros kun vi,
mi volas amuziĝi iom pli.

URSO

Dum ili rapidas kiel sago
Jen urso voĉas kiel papago.
-Suspekta urĝo - urso kapmovis,
eble mielon ie vi trovis?
- Ne, sed scivolon vekas nun mian
kial Ero ŝatas domon sian.
- Domaĉo putra! Je mia diro,
La mian mi donus kontraŭ piro.
Mi ĝin fordonus por abelujo,
diras la urso apud kverkujo.
Mi ankaŭ iros, ŝatanta blagon,
por vidi stultulon. Bonan tagon.

APRO

Triopo urĝas riverrapide,
subite iu marĉo envide.
Apro en akvo ĝoje baniĝas,
dormemas, en ĝi bone sentiĝas.
- Hej herooj, suspekta kurantaj,
ĉu ie oni estas manĝantaj?
Kun multa bruoj la apro saltas,
kaj lupoj al ĝi jene rebatas:
- Ni serĉas kaŭzon, vi kota besto,
kial erinac' ĝojas en nesto.
La propran neston, kun la aranĝo,
mi fordonus por bona tagmanĝo.
Mi iros kun vi, ŝercon mi ŝatas,
mi stultan Eron vere kompatas.

ANTAŬ LA ERINACA DOMO

Ĉiuj hastas al la celo sia
Bruoj sonas de piedoj iliaj.
Atingis Eron kiam li saltis,
kaj apud kverka trunkaĉo haltis.
Sub trunko truo, en ĝi liteto,
el molaj kaj sekaj folietoj.
Tien Ero iris, tute ĝuega
Kuŝiĝis en lito feliĉega.
Liton ordigis, ĝoje kuŝiĝis,
kaj plezure en lit' streĉiĝis.
Beata, bonsenta, en dom' sia
- Hejmeto kara, libero mia.
Palaco bela kun ligna plafon'
mola kaj dolĉa kiel bonbon'.
Mi ĉiam al vi brave fidelos
Neniam al vi mi tre koleros.
En vi mi vivas ĝoja, sentima,
defendos vin per forto senlima.

TRI KRIAĈULOJ

Urso, apro kaj lupoj kolera,
ektondris kiel ventego vera.
- Stulta erinac', pikila avo
kial al vi plaĉas la bestkavo?
Kabano via, vere multaĝa,
Putra tegmento, kuŝejo aĉa.
Hundej' malvasta, fetoraj buloj,



Fotis Ivan Špoljarec

ĉio malloga, eble kun puloj.
Fordoni domon por interŝanĝo,
ni vere pretus por bona manĝo.
Diris triopo kriante plie
sed ruza vulpo pensis alie.

RESPONDO DE ERINACO

Ekstaras Ero, brilas okuloj.
respondas al bruoj kriaĉuloj:
- Mia domo estas senkompara,
kia ajn, al mi ĉiam tre kara.
modesta, en ĝi mi ne koleras,
En mia dom' mi mastras, liberas.
Mi diligentas kaj ŝatas la ĉason.
Kvietas mi, ne ŝatas amason.
Nur aĉuloj vendas domaranĝon
Por ricevi la bongustan manĝon.
Nur triopo sencerba, malplaĉa,
estas senhejma, por ĉiuj aĉa.
Vi vivas vagante kaj bandite,
Vi finos la vivon kondamnite.
Komprenas mi, pravas erinaco,
Vulpo mienas sur sia spaco.
Dirinte tion ĝi flanken fuĝis,
kaj la triopo kriante muĝis:
- Ni devas diri, Ero ne pravas,
stulta li estas, nur tio gravas.

FINO

Ĝio tiam? Kia estis fino?
Ĉu kun malgajo, ĉu kun fascino?
Sangsuĉan lupon, diablo forprenis
ĉar ĉasistaro al li venis.
Abeloj urson pikis ĝismorte
kvankam rezistis li ege forte.
Kaj la apron faligis fusilo
Kaj tiel ĉesis ĝia vivstilo.
En la arbaro, sen pado, vojo
Erinac' Ero vagas kun ĝojo.
Lertul' kaj majstro ĉirkaŭrigardas,
la propran domon konstante gardas.

BRANKO ĈOPIĆ (1949)

Esperantigis Zlatko Tišljar (2019)

En la jaro 2017 reĝisorino Eva Cvijanović finis la animitan pupfilmon La domo de la erinaco inspirita per la poemo de Branko Ĉopić por kiu ŝi gajnis multajn premiojn. Ŝi naskiĝis en Sarajevo, elmigris dum la milito kaj diplomiĝis pri reĝisorado en Universitato Concordia en Montrealo.

De kiam la revuo *Hejmo* anoncis la premiludadon *Tranombro niajn kolombojn*, la urbaj rubrikoj de niaj tagĵurnaloj fariĝis plenplenaj da leteroj pri tiuj ĉi plumestaĵoj.

Kelkaj legantoj nomis ilin la ornamaĵo de la urbo, komparante ilin kun iliaj veneciaj kolegoj. La aliaj, kontraŭe, opiniis ke la kolomboj estas pentopunoj, kiun meritas la urbanoj, ne zorgante pri la pureco de la urbaj stratoj. Estus malfacile diri kiuj pravas koncerne tion.

Urĝante al la recitalo *Balado de Prometeo*, kie oni legos poemojn de la fama poeto kaj mia najbaro Marko, mi ne povis eviti la lokon kie niaj plumaj samurbanoj konstante flugis. Ĝuste kiam mi volis eniri la Domon de la kulturo min superflugis la griza birdaro el kiu iu liberpafisto trafis mian bluan surtuton. Eble la saman tagon kolomboj nombris la amikojn de la poezio?

Dum Marko alvokis muzojn, mi meditis kiel senmakuliĝi. Fine mi decides aktivigi ĉiujn fluidaĵojn stokitajn en mia banĉambro.

Vane. Kiam la surtuto sekiĝis, la birdaj postsignoj estis eĉ pli videblaj ol antaŭe. Mi apenaŭ sukcesis purigi la butonojn. La surtuto devis alveni en la manojn de profesiuloj.

La kemia purigejo *Feniks* finis sian laboron post unu semajno. Bedaŭrinde la surtuto kiun la profesiuloj redonis ne estis la mia. Post unuhora disputado iu klera junulo el la purigejo perceptis ke temis pri la malnova serio de numeroj. La redonita surtuto estis la propraĵo de malgranda teatro, kies aktoroj uzis ĝin en la komedio *Revizoro* de **Gogol**.

Finfine mi ricevis mian propran surtuton. Ĝi estis senmakula, sed ĝi ne havis siajn butonojn. Anstataŭ la originalaj, mi rimarkis la latunajn butonojn kun toporetoj kaj kasketoj de sankta Floriano, la patrono de fajrobrigadistoj. La purigistoj devis klarigi ke ili devis depreni ĉiujn butonojn antaŭ ol bani la surtuton en la kemie agresema solvaĵo. Dum ili denove alkudris la civilajn butonojn, mi demandis la laborestron ĉu la makulo povus reaperi.

- Nur en la kazo ke vi eksponas la surtuton al altaj temperaturoj, al relative alta humideco kaj al Roentgen-radioj.

Mi kvietiĝis. Lastatempe mi malofte vizitis la monsunregionojn kaj la recikladon de uranio mi devis prokrasti pro manko de krudaĵoj. Tamen, la makulo reaperis. Mi ree decidis preni ĉion en miajn proprajn manojn.

La kolekto de ŝpruciloj *Universal* estis ĝusta rimedo kiun mi bezonis. Forportante mian surtuton



Fotis Ivan Špoljarec

al la balkono, mi ekpemis la unuan ŝprucilon kaj abunde malsekigis la birdajn postsignojn. La makulo restis videbla sed la butonoj ne plu. Nur tiam mi konstatis ke mi konfuze uzis la fluidaĵon por faciligi malŝraŭbadon de la rustitaj boltingoj. Kiel mi poste aŭdis ekzistas aparta ĥemiaĵo por la dekstra kaj la maldekstra kanelo. Eĉ por la metrikaj kaj la la anglaj Whitworth-boltingoj.

La alia armilo el la arsenalo de ŝpruciloj estis la ujo kun la etikedo *Makulmorto*. Post la abunda ŝprucado de mia surtuto, la makulo malaperis de ĝia antaŭa flanko sed reaperis sur la dorsa. Mi haltigis la purigadon, timante ke la makulo aperu sur la balkona pordo, de kie estus tre malfacile movi ĝin al malpli videbla loko.

Eltranĉinte la makulitan pecon de la teksaĵo, mi meditis kiel liberiĝi de ĝi. Bruligi ĝin mi ne povis ĉar en la modernaj hejmoj fajroj preskaŭ ne ekzistas. Mi fine decidis enfosi ĝin en la ĝardenon de mia poeto najbaro Marko, kiu parte kulpis pro miaj malagrablaĵoj. Ankaŭ li suferu!

Marko ne suferis. Mia najbaro ne nur amikiĝis kun la muzoj, sed ankaŭ kun la diino Flora. La poeto kutimis kultivi florojn kaj regule partoprenis la ĉiujaran konkurson *La parado de la rozoj* kiun jam konata revuo *Hejmo* organizis dum multaj jaroj.

Ĝis ĉi tiu somero Marko ne akiris grandan sukceson, sed dum la lasta konkurso li surprizis ĉiujn. Lia terozo *Valencia*, la ruĝa floro intensodora, fariĝis vera eltrovo. Mia najbaro gajnis la unuan premion por la variaĵo de ruĝaj petaloj kun la blankaj makuloj. Tion ankoraŭ neniu iam sukcesis. Rozfakuloj kredis ke Marko uzis specialan greftan bazon.

Dragutin Balagović
(1933 – 1997)

Bonvenon al la jubileanta Bjelovar en septembro

Granda estas la kaŭzo ke ni ĉi-septembre vizitu **Bjelovar**: Esperanto en **Bjelovar** atingis sian 110an jubileon kaj esperantistoj preparas grandan 3-tagan feston, la 7-an Renkontiĝon „Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo“. Honore al 110 jaroj de Esperanto en Bjelovar okazos la programoj de la 20a ĝis la 22a de septembro 2019.

Jam en septembro oni muntos ekspozicion „110 jaroj de Esperanto en Bjelovar“ en la urba muzeo, kie oni prezentos ankaŭ la samtitolan monografion. La ekspozicio okazos ankaŭ en la Popola biblioteko **Petar Preradović**. Ekspozicio de pentraĵoj de **Luce Cetinić** el **Split** okazos en Dolĉaĵejo **Zagorje**.

Dum la programo oni starigos memortabulon al **Vilim Polašek**, unu el la plej meritaj bjelovaraj esperantistoj.

Deklamkonkurso estas ankaŭ ĉi-jare la tradicia ero de la bjelovara renkontiĝo.

Bjelovara Esperantista Societo lanĉos okaze de la festo specialan filatelian koverton kaj la 21an en la urba poŝtoŝtampoj oni uzos specialan poŝtstampon.

La trian tagon, dimanĉon la 22an de septembro okazos ekskurso al **Đurđevac**, kie ĉe la adreso Bana Jelačića 138a tagmeze okazos solenaĵo kaj malfermo de la nova domo de Dokumenta Esperanto-Centro kaj starigo de la memortabulo honore al sponsoroj. Tiel la riĉa 40-jara dokumentokolekto de **Josip Pleadin** ricevos sian apartan hejmon.

La kotizo por la Esperanto-festo en **Bjelovar** estas 50 kn. La kotizpagantoj rajtos ĝui la senpagan ekskurson al **Đurđevac**.

Eblas tranokti en la bjelovaraj apartamentoj. Detaloj ĉe **Franjo Forjan** 0917973484 kaj **Zdenka Polašek** 098930 2906, 098181 7350.

Franjo Forjan



NEDELJKO KORASIĆ (1935 - 2019)

Tre escepta esperantisto Nedeljko Korasić mortis en sia 84a vivojaro en Zagrebo la 12an de februaro 2019.

Li partoprenis en aktivado kaj de Studenta Esperanto-klubo kaj de ĝenerala Esperanto-societo. Ĉiu kiu venis al tiuj societoj unue ekkonis lin. Tre sprita persono kaj ŝatata de ĉiuj. Li ŝatis foti la naturon kaj havas grandegan arkivon de fotoj.

Li naskiĝis la 14-an de julio 1935 en Varaždina kaj finis elektroteknikan fakultaton en Zagrebo. Li laboris kiel estimata inĝeniero en Kroataj Fervojoj kaj en reprezentejo de Siemens en Kroatio.

Li esperantistiĝis en kvindekaj jaroj kiel studento en Zagrebo. Estrarano de Studenta Esperanto-Klubo kaj poste de Esperanto-societo Bude Borjan. Kursgvidanto kaj gvidanto de multaj montgrimaj ekskursoj. En 1973 aperis lia traduko de „Melo antaŭ Tribunalo“ de Petar Kočić (IKS Zagreb). Li elfrancigis du bildstriojn pri Asteriks kiuj aperis ĉe Izvori Zagreb. Li tradukis plurajn skeĉojn por Drama Sekcio de Studenta Esperanto-klubo. Estrarano de Kroata Esperanto-Ligo kiu grave kontribuis al la granda projekto de KEL pri la aĉeto de la novaj ejoj en Zagrebo 2003. Kiam tiu projekto estis en danĝero pro manko de mono por repagi bankkrediton, li persone pruntedonis gravan sumon por solvi tiun problemon.

Zlatko Tišljar



Fotis Ivan Špoljarec

ANKA ŠPEHAR-ŠANTOLIĆ (1929 - 2019)

En Zagrebo mortis la 25an de februaro Anka Špehar-Šantolić en sia 90a jaro. Ŝi naskiĝis en Cerovnik (en ĉirkŭaĵo de Ogulin) la 16-an de decembro 1929. Ŝi finis ekonomikan mezlernejon kaj fariĝis statistikistino ĉe „Kroataj Fervojoj“. Ekde 1981 ŝi emeritiĝis.

Esperantiĝis en la jaro 1954 en la kurso gvidata en „Fervoja stacidomo“ en Zagrebo. En „Kroata fervojista Esperanto asocio“ kaj ĝiaj antaŭaj organizoj ŝi havis diversajn funkciojn kaj estis sekretariino kaj bibliotekistino.

Ŝi partoprenis multajn IFEF - Kongresojn kaj poste prezentis per lumbildoj pri la travivaĵoj. Ŝi estis tre interesa kunvojaĝantino. Ŝi multe korespondis internacie.

Anka estis tre aktiva ano ankoraŭ en la Montgrimpa societo, Fungista asocio kaj Asocio de emeritaj fervojistoj.

Ŝi ankaŭ tre ĝoje flegis sian ĝardenon kaj ni ĉiuj ĝuis ŝiajn florojn.

Roža Brletić-Višnjić



Fotis A. Kranjčić

AL MIRIAM'

Mi estas Pompejo, vi estas la lafo
Mi estas la taso, vi estas la kafo
Mi estas la astro, vi estas eklipso
Mi estas la rompo, vi estas la gipso
Superas vi ĉion de mi kun la am'
Amata Miriam'

Mi estas la ŝipo, vi estas la lago
Mi estas kremaĵo, vi estas la frago
Mi estas muziko, vi batas la takton
Mi estas la bebo, vi donas la lakton
Superas vi ĉion de mi kun la am'
Belega Miriam'

Mi estas la sango, vi estas la vejno
Mi estas Mozelo, vi estas do Rejno
Mi estas minuto, vi estas sekundo
Mi estas ŝafido, vi estas ŝafhundo
Superas vi ĉion de mi kun la am'
Prudenta Miriam'

Mi estas malsana, vi estas fleganto
Mi estas sonbendo, vi estas la kanto
Mi estas simio, vi estas la arbo
Mi estas la fajro, vi estas la karbo
Superas vi ĉion de mi kun la am'
Karega Miriam'

Mi estas okulo, vi estas la vitroj
Mi estas la kalo, vi estas la citroj
Mi estas la buŝo, vi estas la kiso
Mi estas scenejo, vi estas kuliso
Superas vi ĉion de mi kun la am'
Afabla Miriam'

Mi estas la edzo, vi estas edzino
Mi estas la patro, vi estas patrino
Vi estas Francino, mi estas Germano
Vi estas, mi estas, jes ja, Eŭropano
Superas mi ĉion de ni kun la am'
Klaŭz' kaj Miriam'

Claus J. GÜNKEL

